Aŭstria Esperantisto

Oficiala organo de Aŭstruja Esperanto-Delegitaro (A. E. D.), Esperanto-Delegitaro de Wien (E. D. W.), Tutmonda Esperantista Ligo Fervojista (T. E. L. F.) kaj Universala Esperantista Pacifista Ligo (U. E. P. L.)

2a jaro. No. 3 **Monata** **Marto 1925**

Redaktejo kaj administrejo: Korneuburg ĉe Wien, Hovengasse n-o 12, II, 13

Kunlaborantoj! Skribu legeble, retenu kopion, aktualaĵojn sendu ĝis la 1a de l' monato Manuskriptoj ne resendataj.

Jarabono: Por Aŭstrianoj kaj Germanoj 30.000 aŭ. K, Alilandanoj 3.50 svis. fr.

LA UNUA JARO DE RADIO EN AŬSTRIO.

1923—1924.

Orig. artikolo laŭ materialo disponigita de s-ro d-ro *Ladany* (ĉefredaktoro de „Radiowelt") verkita de *Walter Smital*, Wien.

La unuan fojon en junio 1923 funkciis radiosendilo en Aŭstrio. Ŝin anoncis la prova sendstacio „Radio-Hekaphon" (ondo 700), kiu per la antenoj de „Radiotechnische Versuchsanstalt des Wiener Technologischen Gewerbemuseums" (t. e. Radioteknika provejo de l' Wien-a teknologia metiarmuzeo) dissendis la unuajn radiosalutojn aŭstriajn „Al ĉiuj!" Sed nur malmultaj aŭskultis: iamaj radiistoj de l' militmaristaro kaj armeo, elektroinĝenieroj kaj kelkaj studentoj de Teknika Akademio.

Ankoraŭ en aŭtuno 1923 la cirkonstancoj estis tre nefavoraj por disvastiĝo de Radio en la publiko, ĉar tiu estis laŭleĝe malpermesita: La estraroj deklaris la ordonoj por ŝirmo de l' telegrafa sekreto validaj ankaŭ por Radio.

La amatoroj celantaj liberigi tiun kulturilon fondis la 29. septembro 1923 Aŭstrian Radioklubon, kies taskoj estis, ebligi al ĉiuj liberan senfadenakcepton kaj diskonigi la kulturan kaj ekonomian gravecon de Broadcasting per publikaj paroladoj.

Mankis organo. Ĝin fondis (10. novembro 1923) s-ro kapitano Eugen Winkler sub la titolo „Radio-Rundschau für alle" (t. e. Radio-Revuo por ĉiuj). Sed ĉefe popolarigis la ideon la Wien-a gazeto „Die Stunde" (t. e. La horo), kiu depost la 12. decembro 1923 aperigas posemajnan aldonon „Die Radio-Stunde", redaktitan de d-ro Josef Székely, kaj samtempe instalis la unuan Radio-salonon en Aŭstrio. Aliaj gazetoj imitis la ekzemplon.

La publikaj paroladoj de inĝ. F. H. Hofmann, prof-ro d-ro Schwaiger, d-ro Eugen Nesper, grafo Arco, kap. Winkler, prof-ro d-ro Richtera, s-ino d-ro Horsky k. c. estis amase vizitataj; ekestis R.-movado: Akademianoj fondis „Wien-an R.-Amatorklubon", fondiĝis „Internacia R.-klubo", „Libera R-klubo", „Aŭstria R.-ligo".

Ankaŭ en la liglandoj — ekster Wien — en Graz, Linz, Klagenfurt, Salzburg oni fondis R.-organizojn.

En printempo 1924 la juna R.-industrio kaj -komerco preparis la unuan R-foiron en la kadro de Internacia Printempa Foiro en Wien: Malgranda komenco kun grandaj sekvoj. Aperis ĉe la malfermo la unuan fojon nia plej grava R.-ĵurnalo „Radiowelt" (t. e. Radiomondo), kies redaktoro estas s-ro d-ro Ladany. Per vortoj kaj bildoj ĝi montras la praktikajn uzeblojn de Radio, ĝian rolon en ĉiutaga vivo kaj en la

kulturvivo, enhavas artikolojn de aŭtoritataj fakistoj kaj akcelas la amatorliberecon kaj R.-demokration.

La movado senekzemple progresis post la instalo de ĉiutaga sendado. Fine de decembro 1924 nombro da 75.000 R.-abonantoj estis atingita.

Kiel en aliaj landoj ankaŭ ĉe ni devis okazi batalo por la R.-libereco. La monatojn daŭrantaj traktadoj pri reguligo perleĝa de l' novrimeda interkomunikigo okazis ĉe l' oficeja tablo, kie oni aŭskultis nur la opiniojn de la fakreferantoj, teknikistoj, juristoj kaj administraj oficistoj, sed ne la voĉon de l' popolo. Post kiam oni estis ekkoninta, ke temas pri grava faktoro de la moderna kulturvivo ĝenerala, de l' popolklerigado, ekonomio, artodisvastigo kaj publika raportado — „Radiowelt" iniciatis enketon, kiu okazis la 30. majo 1924 partoprenata de reprezentantoj de registaro, polico, armeo, patentoficejo, Ĉambro por komerco kaj metiaro, politikaj partioj, R.-amatoroj, -industriistoj,- komercistoj kaj de l' gazetaro. La efikoj estis: akra kritiko je la leĝpropono, la decido fondi el ĉiuj rondoj je Radio interespartoprenantaj konsilantaron por la leĝfarantoj cele de libera evolueblo de l' radiado, nelimigita ricevlibereco, egala uzeblo de la disaŭdigstacio por ĉiuj sociaj rondoj, akcelo de l' enlanda industrio kaj komerco. Ĉio ĉi estu en la leĝo klare kaj nedubeble certigata.

En la parlamento oni la unuan fojon debatis pri Radiotelefonio en aprilo. La 18. julio 1924 la nacia konsilantaro akceptis la novan proponon pri telegrafa leĝo reguliganta la R.-aferon. Ĝi estas kadra leĝo kaj ekvalidis la 1. oktobro 1924. La plej gravaj problemoj estis solvotaj per efektivigordonoj de la plej supera R.-estraro, la Ĝeneraldirekcio de la Poŝt- kaj Telegrafadministracio, kiu en ili cedis al justaj deziroj de amatoroj, industrianoj kaj komercistoj.

Batalado ankaŭ okazis pro la koncesio por enlanda disaŭdigo. Post multaj monatoj oficiala komuniko sciigis (19. februaro 1924), ke la ministra konsilantaro transdonis la koncesion por R.-telegrafa,-telefona kaj disaŭdiga servo enlanda al enlanda grupo de tri financinstitutoj kaj sep elektrofirmoj. Sed post tiu komercista konkuro okazis alia inter la politikaj partioj fininta per kompromiso. Nun ankaŭ la komunumo Wien partoprenas la koncesion kaj tiel povas influi la organizadon kaj programelekton.

La 30. septembro 1924 estis konstituata „Ravag" (t. e. Oesterreichische Radio-Verkehrs-A.-G. [Aŭstria Radio-Interrilat-Societo Akcia]), kiu ricevis de la registaro (19. februaro 1924) la solan rajton al funkciigo de publikaj instalaĵoj por senfadena telegrafio, telefonio kaj la tuta disaŭdigo.

Merkrede, 1. oktobro 1924, je la 18a la disaŭdigstacio „Radio Wien" estis solene malfermata kaj je la 19a horo sendata belega malferma programo. Ĝi laboras per lamelmikrofono laŭ Siemens — nuntempe la plej perfekta — kiu reproduktas la voĉon sen ŝanĝo de ĝia nuanco kaj funkcias absolute sen krombruetoj. La lamelo konsistas el aluminia ladeto 4 mm larĝa, kiu troviĝas inter la polusoj de tre forta elektromagneto. Per movoj kaŭzataj de sonoj en ĝi estas pro indukto flanke de l' magneto produktataj direktŝanĝaj cirkuitoj, kiuj precize reproduktas la instigantajn sonondojn. La sendilo estas konstruita de la firmo „Telefunken". La senditubo (tipo „R. S. 15") liveras altfrekventenergion da 1 kw (kilovato) en formo de nerestringitaj osciloj. La T-anteno estas portata de du ferkradaj mastoj, 41 m altaj. — —

La internacian radioservon peras „Grossfunkstation der Radio-Aŭstria-A.-G.". Ĝi estis fondata de privata societo kun partopreno de la registaro per akcia kapitalo da 133.000 anglaj funtoj. La 12. januaro 1924 la unuaj radiosalutoj flugis eksterlanden. La teknika instalaĵo konsistas el tri partoj: la centro (en la unua urbdistrikto, Renngasse 14), la sendstacio (en Deutsch-Altenburg) kaj la ricevstacio (sur Laaerberg ĉe Wien). La sendstacio laboras

per du sendiloj; unu uzas sendenergion da 25 kw, la alia 6 kw. La antenoj estas strečitaj inter du ferturoj 151 m altaj. La elektron ĝi ricevas da la urba elektrofarejo en Wien, sed havas ankaŭ Dieselmotorojn por eventualaj funkciinterrompoj. Ĝi estas instalita por rapidtelegrafado, kio ebligas sendadon da eĉ 120 vortoj (proks. 600 Morsesignoj) en unu minuto. La ricevon sur Laaerberg peras granda duobla kadroanteno 62 m alta, kiu funkciigas kvar ricevilojn. Povas esti akceptataj ondoj ĝis 20 000 m longaj. Aŭtomate la radiogramoj estas transportataj de tie per metalfadenoj en la centron. Ĉi tie ekzistas tri ricevebloj: a) per simpla kapaŭskultilo (la oficisto skribas la tekston per skribmaŝino); b) per aparato, kiu aŭtomate transskribas la telegramon sur paperstriojn per Morsealfabeto. (Tiu aparato ĉiam kontrole kunefunkcias ĉe metodo a); c) per Creed-ricevilo. (La signojn ricevitajn ĝi pere de truojn havanta strio aŭtomate transskribas en alfabetajn signojn sur paperstrion, kiu gluita sur telegramformularon estas sendata al la adresato.)

La stacio „Radio-Aŭstria“ sendas regule per la 6 kw-sendilo per ondo 3050 al Berlin, Warschau, Belgrad kaj Sofia, per la 25 kw-sendilo al London, Moskau, Bukarest, Grosswardein kaj Temesvar.

Al sekurigo de la aviado servas radiostacio en Aspern ĉe Wien.

La stacio „Radio-Hekaphon“ instalita de la firmo Czeja, Nissl & Co., Wien XX, en Teknologia Metiarmuzeo ne plu funkcias de post 1. septembro 1924.

La partoprenantoj de la XVIa en aŭgusto 1924 certe memoras ankoraŭ la prezentadojn de tiu ĉi unua disaŭdigstacio en Wien.

Nuntempe nia esperantistaro senpacience atendas la enkondukon de esperantaĵoj en la programojn de „Ravag“, kio dependos de la rezulto de ampleksa voĉdonado ĝenerala pri la aŭstria programo „Por ĉiuj!“

ALFONS PETZOLD.

Poeto aŭstria.

La patro estis laŭ profesio selisto. Pro politikaj kaŭzoj li samtempe kun la fama Liebknecht estis arestita sur fortikaĵo Königstein. Katastrofoj poste kaŭzas transloĝiĝon de la gepatroj al Wien, kie Alfons Petzold naskiĝis 24. novembro 1882.

Post la unuaj jaroj de sia vivo li partoprenas la monaĥejlernejon dum kelkaj jaroj. Baldaŭ li interesiĝas pri la klasikuloj, kiuj plenumas lian animon per antaŭe ne sentitaj belecoj. La dektrijarulo legas el malnovaj, multuzitaj Reclam-volumetoj Schiller kaj Goethe, Kleist kaj Shakespeare; Freiligrath, Herwegh kaj Heine faras ĉe li grandan impreson. Mizero pelas la infanon en la batalon por vivo, al kiu li laŭ siaj fortoj ne estas taŭga.

Li lernas ĉe arĝentforĝisto, estiĝas metia lernanto ĉe ŝuisto, bakisto kaj masonisto. Ĉiu majstro forsendas lin post kelkaj tagoj — Petzold estas tro malforta por laboro. Malsana, malsata li petegas je laboro. Taglaboristo li estas, neĝonŝovelisto, privata instruisto. Ankoraŭ vivas lia patrino, ankoraŭ li posedas hejmon.

Pulminflamo forrabas de li laboreblecon. Lia talento havigas al li mizeran nutrajon. Poste li denove estas en la amaso da senlaboruloj. Li estiĝas hejtisto, karbonportisto, servisto de redakcio, brikĵetisto ĉe domkonstruo.

La socialaj ideoj ekkaptas lin. En Ottakring — laborista distrikto en Wien — li prelegas timeme siajn revoluciajn poemojn kun patoso, viglajn kantojn pri venĝo. Denove li gajnas sian panon per penlaboro: li estas fenestrojnpurigisto, en frosto kaj ventego li forigas neĝon de sur la tegmentoj.

Lian lastan apogon li perdas: la patrino mortas. La plej terura epoko de lia vivo komenciĝas.

Sen posteno, sen la plej modesta

havajo Petzold vagadas tra la stratoj de Wien. Supojn, kiujn almozpetantoj ricevas ĉe monahejpordojn, li manĝas. Aŭdante pri laboro en la provinco li marŝas tien, laboras tie, revenas hejmen kaj denove malsategas. La ftizo dismordas lian korpon. Post horoj pasigitaj sur malseketmalvarmaj stratoj li ne trovas alian ripozejon ol la malsekajn ŝtonojn de ĉefkanalo. Kiel domservisto li tiras — tremanta pro febro — faifspirante pezan veturileton.

La ĉagreno pri la mankoj en lia scio kaj lia sciavido kondukas Petzold al „Volksheim" (popolhejmo). Prof-ro Emil Reich kaj precipe d-ro Luitpold Stern ekkonas lian talenton kaj kuraĝigas lin. Stern presmaturigas liajn poemojn. La aktoro Ferdinand Gregori trovas la verkiston malsanega. Li sukcesas enhejmigi Petzold en pulmsanigejon Alland kaj poste en Gries ĉe Bozen.

Nun komencas supreniĝo de Petzold. Li famiĝas, noblaj homoj lin subtenas. Sed lia korpo estis tro malsana. Oni kredis lin sanigita, sed li ne estis tia. La kuracisto lin sendas al Kitzbühel, kie Petzold estras librovendejon. La komunumo Wien kaj Martin Andersen Nexö lin subtenas. Sed la mizero restas lia plej fidela kunulo.

Li mortis 25. januaro 1923 en Kitzbühel. Lia morto estas la fino de vivotragedio, la lasta haltejo sur mizera vojo, kian nur malmultaj homoj trapasis.

La plej gravaj prozaĵoj estas la raportoj el lia vivo. La plej ampleksa verko „La kruda vivo" estas aŭtobiografio. Mallongan skizon pri sia kariero li donas en la priskribajo „El la vivo kaj laborejo de estiĝanto".

Petzold estas ĝisfunde lirikisto en „Tero", la plej bela prozajo, kiun li skribis.

De tiu ĉi prozo al verso nur estas malgranda paŝeto. Tie Petzold montras sian plenan, eminentan arton.

Liaj noveloj „Rememoroj de okulo", „Homoj en ombro", „Sil, la migrulo" devenas parte el propra travivajo, parte ili priskribas sortojn el laboristekzistado, parte ili estas prozliriko. Citinda estas „La plendanta spegulo", en kiu Petzold pagas dankŝuldon al Luitpold Stern.

La prozo de Petzold paliĝos, sed lia liriko ĉiam restos viva.

Ĝi estas plena da originaleco, estas esprimo de personeco, de malofta profundeco.

Kiu volas konatiĝi kun la homo Petzold, devas tralegi la poeziajojn de li. La prozo priskribas eksterajn vivotragediojn, lia poemaro malkovras la animon.

H. Steiner.

La prozajojn de Petzold
trad. *W. Smital,* Wien.

INTERIEUR.

Dimanĉa posttagmezo en monato januaro.

Griza neĝĉielo fikse enrigardegas tra la fenestro.

Antaŭ mi sur la tablo staras en alta vazo longtrunkaj rozoj je la pala malsanema speco de vitrodomaj plantoj.

Ilia malsana florado ne kaŭzas ĝojon ĉe mi, ne povas al miaj pensoj sorĉe ŝajnigi — — someron.

Apude kantas delikataj helaj voĉoj de knabinoj kanton de Heine-Schumann, kiu — ŝtelirante tra la jam komencanta krepusko — ludas ĉirkaŭ miaj sentoj.

Estas melankolia kantado.

La sonoj ŝajnas al mi esti kantataj larmoj.

Kaj tiel laca faras ĉi tiu knabinkantado en tiu vintrotago tratremata de nekomprenebla rezigno, pasanta melankolie.

Miaj okuloj duone fermiĝas, misteraj ombromuroj konstruiĝas ĉirkaŭ mi. El la palaj longtrunkaj rozoj sur la tablo unu melankolie kapjesas al mi.

La kanto sonfinas.

Kaj mia animo perdas la sentinterrilaton kun la vivo ardanta, kiu ankaŭ en vintro festas siajn ĝojajn festojn ie.

LA SCIENCULO.

La maljuna scienculo igas laŭ la turnilo de sia pensado malsupren gliti en la profundon la ĉerpsitelon de sia scio.

La sitelo mallevigas kaj mallevigas en la malhelan puton de l' mondenigmoj, kiun fosis eternecoj.

Horon post horo la maljuna scienculo sidadas en la sortojn naskanta senbrueco de la nokt'.

Ĉiuj liaj sentoj maldormas.

Kelkfoje li serĉlumigas per kuraĝekflamanta penso en la puton.

La torĉo estingigas en la malvarmeta blovo de la profundo, kiel malsekigata tindro.

Li aŭskultas, sinklininte trans la putborderon, malsupren en la terurigan krutfosaĵon.

Li aŭdas, kiel la sitelo pušbatas sur ŝtonaron malmolan.

Eble frakasiĝas la ujo facile rompebla antaŭ la atingo de fundo.

Tremegas pro angoro cerbo kaj manoj de la maljuna sciencul', ĉar la sitelo estas lia vivo.

ANTAŬ LA BILDO DE E. KROENER „EN LA BRULANTA MINO".

Neniun bildon rigardu nur per la okuloj; tiuj vidas nur tre malgrandan spaceron de l' mondo, minutopecon de l' eterneco. Sed vi rigardu pli profunden, per la animo.

Frumatene ili enveturis — la ministoj — ili ne vidspertis el la juna suno, ke por ili ĝi leviĝis la lastan fojon.

Antaŭ tagmezo la arda besto de l' gasbruliĝo blovspiregis tra la mino.

Jen vi staras nun antaŭ la bildo kaj vidas kun` tremiga teruriĝo la tragedion de centoj da laboristovivoj.

Vi sentas vin ĉirkaŭitaj de la fajro formanĝeganta, sentas la ŝirantan denton de l' flamoj je via korpo. Vi estas la karbohakisto, kiu kun fumsufokata helpkrio montras al la elirejo. Ĉiun ĉi turmenton, vivavidon, ĉiun teruran brulvundon, ĉiom da la mizera espero via animo kunesentas en minuto tiu ĉi de l' rigardado.

Sed nun ĝi ankoraŭ pli multon vidu ol nur ĉi minbrulon pentritan.

Ĉiujn la milojn kaj milojn da minoj, per kiuj la ter' traboriĝis iam kaj nun.

Ĉiujn milionojn da la proletoj, kiuj en profundaĵoj laboris, laboras.

Ĉiujn zorgojn, ĝojojn, malesperojn kaj esperojn de ili.

La mano de l' forkuranta hakisto ekestu por vi simbolo de la liberiga batal' de l' proletaro.

Tie — tie estas sunlumo — ilia savo.

Tiel vi devas stari antaŭ ĉiu bildo, antaŭ ĉiu objekto.

Jen vi riĉiĝos je mondonekkono.

La poemojn de Petzold
trad. *F. Zwach*, Wien.

LA MALJUNULINO.

Mi grizulinon mantremantan vidis,
— Ŝi longe siajn donojn jam malŝparis —
Dum ŝi en ligna apogseĝo sidis
Kaj ĉifan blanktolaĵon reriparis.

Dum la printempo arde ŝin insidis,
Per brilkoloroj ŝian vidon baris,
Ŝi la finaĵojn tolajn kunsolidis
Kaj sian lastan forton malavaris.

Hodiaŭ eble ŝi ne vidos jam
De tiu tago ĉi la sunsubiron
Kaj en de l' vespervento dolĉa spiro

Forsonas ŝia vivomelodram'.
Mi staras mute; mia vido kava
Ne turnas sin de l' manoparo flava.

LA STRATLABORISTO.

Dume mi en verdevolva
Laŭb' ripozas sen dezir',
Sidas sur la strato polva
Ombronsopiranta vir'.

Tie batas diligente
Ŝtonojn li en arda sun',
Interrompas nur momente,
Sian pipon ŝtopas nun.

Kaj li klinas sin denove
Sur amason de l' granit',
Ĝin martelas ekstrempove
Ĝis el dors' vaporas ŝvit'.

Kaj la flama okulparo
Turnas ofte sin al mi,
Sorbas el laŭbfoliaro
Freŝon kaj malamon ĝi.

VINTRONOKT'.

En strat' aŭdiĝas bru' aŭtomobila,
La eĥo dancas laŭ domvico sferen,
L' aero tintas vitre, kvazaŭ brila
La nokt' rompiĝus jen kaj jen mult-eren.

Tra l' frost' belecon kaj malvirton tiras
Ineto peltvolvita kaj gracia.
Neĝbalaistoj pulmvaporon spiras
Kaj blasfemadas pro l' pavim' glacia.

LA ROZO.

De *Emil Ertl.*

(Fino.)

La infanoj montris, kion ili estis aĉetintaj ĉeestante la foiron. Rudolf poŝtkartojn. Kompreneble li kolektis; nome laŭ geografia konsidero. Pejzaĝojn, nenion krom pejzaĝojn. Aĵojn, kiuj ne estis realaj, liberajn elpensaĵojn de artistoj li ne ŝatis. Ilin li konsideris ne solidaj. Manjo aĉetis mirindan ludilon. Estis stablo kun kvar radoj kaj supre porka veziko, kiu ege ŝveliĝis, se oni enblovis. La aero malrapide elfluanta naskis la sonon de trumpeteto kaj samtempe movis la etan veturilon, se oni metis ĝin sur la tablon aŭ sur la plankon. Faris tre amuzigan impreson, se la veturilo aŭtomate ruladis, dum la trumpeteto sonis kaj la ŝveliĝinta sako kondukata per ĝi iom post iom malgrandiĝis. La infanoj longe amuziĝis per tiu komika ludilo; returnigis, haltigis ĝin, igis ĝin veturi supren kaj suben kaj ĉiam denove plenblovis ĝin, tuj kiam mankis al ĝi la spiro. Amuzite la gepatroj rigardis.

„Kion do eltrovas la homoj!" diris Anjo.

Oskar ekbalancis la kapon, dirante: „Jes kaj, se oni pripensas, ke certe iomete da kolero estas necesa por elpensi ion tian!"

Post kiam oni enlitigis la infanojn, Oskar ekbruligis cigaredon kaj demandis: „Ĉu la lampo en mia skribejo brulas?"

„Ĉu denove labori?" Anjo ĝemis.

„Jes, tiu broŝuro fine devas esti preta."

„Almenaŭ finu la fumadon de via cigaredo!" ŝi petis.

Li restis. Ŝi prenis la blovveturileton, kiun la infanoj lasis sur la tablo, plenblovis kaj kurigis ĝin super la tapiŝon. Ĝi trapenetris pene, sed persiste la malglatan subaĵon. Dum kelka tempo ĝi ektiris kvazaŭ etan lokomotivon kaj samtempe sonorigis la trumpeteton. Poste la porkveziko malŝveliĝis, ĉifiĝis kvazaŭ faltiĝinta haŭto kaj per longdaŭra, ĝemanta, malbela sono la lasta vivoforto forflugis. Nun ĝi haltis. Oskar kaj Anjo ridis. Li devis ridi tiel, ke liaj okuloj pleniĝis je larmoj; tiagrade la aĵo ŝajnis por li esti komika. Li ekridis preskaŭ nervoze, ekscitite.

„Vi ne tiom laboru," ŝi diris. „Tio ja devas eksciti viajn nervojn kaj fine igi vin malsana."

„O, mi iom elportas," li respondis komforte. „Laborado ne malsanigas min. Ĝi ja estas la plej granda plezuro, kiu ekzistas."

Li ekstaris kaj en la manĝoĉambro iris tien kaj reen.

„Jen," li diris, „kio ekscitas la nervojn, nur estas, ke oni ne trovas dankon. Mi ne volas diri rekompencon, mi intencas diri dankon. Ĉie nenio krom malamo, malkomprenoj, kalumnioj; de ĉiuj flankoj. Kaj oni faras sian plej bonon, turmentas sin en horoj dubo-plenaj, kiamaniere oni povus konsili, utili, helpi. Oni volas fari ion bonan, fordoni amon kaj ĝuste tiuj, kiujn ni celas per tio, ne komprenas, apenaŭ sentas ĝin. Jen, tio estas fakto, kiu kelkfoje iomete ekscitas min."

„Jes, tiel estas," ŝi diris malgaje.

Li aliris al ŝi kaj kisis ŝian frunton. „Nu, tio nur estis malgranda ataketo... Mi ne lasas konfuzigi miajn celojn kaj ĝis nun mi ankoraŭ restis venkinto." Kaj kun ekvido sur la horloĝon li diris: „Sed nun mi devas esti diligenta."

Li malfermis la pordon al sia laborĉambro, sed ree haltis kaj demandis: „Kion do Grenjo aĉetis ĉeestante la foiron?"

„Grenjo? La rozon."

„Kiun rozon?"

„Nu, la rozon, kiun ŝi alportis por vi."

„Kiun ŝi alportis por mi?"

„Jes. Ŝi do alportis por vi rozon.“

„Rozon? Por mi?“

„Jes. Jam irante tien, ŝi min demandis, ĉu en la foiro rozoj estas aĉeteblaj. Verŝajne, mi diris, la sinjorinoj vendos ilin al la sinjoroj pro la bonfarado. Tiam mi aĉetos rozon por paĉjo', ŝi diris.“

„Sed ŝi ne donis ĝin al mi?“

„Jes, ŝi donis ĝin al vi, kiam ni venis hejmen.“

„Kaj mi?“

„Vi ĝin prenis kaj flaris. Kaj poste ŝi demandis, ĉu ŝi rajte povis meti la rozon en la malgrandan bronzvazon starantan sur via skribotablo.“

„Kaj mi?“

„Vi diris, ke tien oni ne rajtas verŝi akvon.“

„Kaj poste?“

„Poste ŝi alportis sian propran porcelanvazeton tien kaj demandis, ĉu ŝi rajtis enmeti la rozon kaj starigi la tuton sur vian skribotablon.“

„Nu?“

„Nun vi diris jes, certe. Sed mi tuj sentis, ke vi ne eĉ sciis, pri kio oni parolis kaj ke tute aliaj pensoj trapenetris vian kapon. Ĉar stranga rideto glitis super vian vizaĝon kaj tuj poste vi ekkaptis krajonon kaj rapide skribis kelkajn liniojn sur la paperon.“

Li kapskuis.

„Oni preskaŭ ne povus kredi tion,“ kaj tra la malfermita pordo ekrigardis sur sian skribotablon. Tie, apud la lampo, staris malgranda porcelanvazo kun bela, granda, ruĝa rozo. Ŝajnis al li, kvazaŭ estus miraklo.

Ĉiu sentimento vekiĝis en lia brusto. ... Vi zorgas por aliaj, rigardas malproksimen, vane sopiras je nur unu malgranda, saniga vorto de danko — kaj estas blinda pri la senfina amo, kiu silente kaj timeteme ĉirkaŭas vin kaj per rozoj ornamas la lokon de via laboro.

Momenton li staris hezitante, poste li returnis sin kaj paŝis tra la manĝoĉambro al la kontraŭa pordo.

„Mi do devas rigardi, ĉu ŝi ankoraŭ maldormas.“

„Grenjo? Jes, donu al ŝi kison kiel noktosaluton, tio feliĉigas ŝin.“

Post momenteto li revenis, singarde, sur la piedpintoj. „Ŝi jam dormas.“

(Kun permeso de la aŭtoro tradukis d-ro fil. *Wolfgang Biehler*, Graz)

NEĜBULBATALO.

La tutan vintron falis neniu neĝo. Jen kuŝis subite lundon, la 23. februaro matene, kiam mi vekiĝis, la plej bela neĝo.

Ĉe la tagmanĝo disponis nia sinjoro direktoro d-ro Watzke por hodiaŭ posttagmeze neĝbulbatalon, al kiu ĉiuj lernantoj partoprenu.

Post la manĝo ni iris sur la grandan ludherbejon kaj ni dividis nin en du partioj.

Unu marŝis sur unu flankon, la alia sur la alian flankon de la ludejo.

Gvidanto ĉe nia partio estis lernanto el la sesa klaso. Nun ĉiu kunprenis tri neĝbulojn.

Komence ni marŝis, sed baldaŭ ni atakis

Nun komencis laŭregula neĝbulbatalo. La buloj flugis kiel kanonkugloj.

Jen mi jam ricevis unu al la kapo, sed tio ne difektis min, ĉar mi havis dikan neĝoĉapon. Jen mi havis jam denove unu sur la piedo.

Jus mi volis pafi, sed mi ricevis malamikan kuglon al la mano, per kiu mi volis pafi. Jen mi faligis la bulon. Sed tuj post kiam mi mallaciĝis de tiu pafo, mi jetis la bulon despli forte.

Nia fronto iom estis repremata, sed tamen ni ĉie forte staris.

Kiel mi rigardis al la alia flanko, mi vidis, ke nia alia fronto fortege atakis kaj jam je granda peco antaŭenvenis.

Per tiu atako ekscititaj ni furioziĝis. Ni denove atakis kaj sukcesis. La kontraŭuloj devis cedi.

Nun ankaŭ nia centro antaŭeniris kaj ni forpelis la kontraŭpartion de la ludejo.

La batalon ni gajnis.

Nun ni iris venkokonscie en nian hejmon.

Lothar Steiner,
Liglandedukejano en Traiskirchen

DIVERSAĴOJ.

Ekspozicio pri higieno en Wien okazos komence de majo 1925 je la protektado de nia liglanda prezidanto s-ro d-ro Hainisch. La Esperantistoj intencas partopreni ekspozante koncernajn Esperantaĵojn.

La frekvento de l' aŭstriaj universitatoj. En Aŭstria Respubliko ekzistas tri ŝtataj universitatoj. Laŭ la jus aperinta frekventmontrilo pri la pasinta vintra duonjaro studis tie 13.336 geaŭskultantoj (en Wien 9439, en Graz 2335, en Innsbruck 1562). La juran fakultaton partoprenis 3715 geenskribitoj, inter ili 209 virinoj; la medicinan fakultaton 3970, inter ili 521 virinoj; la filozofian 4927, 1405 virinoj; la teologian 724. *W.S.*, Wien.

Kongreso de Laborista Federacio de l' Franclingvaj Esperantistoj (el Francujo, Belgujo kaj Svisujo). Esp. laborista grupo de Lyon informas nin pri okazigo de tiu ĉi kongreso kaj de Esp.-ekspozicio en Lyon dum Pentekosto.

I. K. A.-grupo en Essen eldonas monatan ĵurnalon (germane kun Esp.-tekstoj kaj kurso) por propagando inter katolikoj germanlingvaj: „I. K. A.-Stimmen". Informojn ĉe kaplano Blum en Essen-West, Sälzerstrasse 64; por Aŭstrio „Katolika Mondo" en Wien I, Schwettgasse 3; por Svisujo I. K. A.-Centraloficejo en Zug.

Aŭstruja Esperanto-Delegitaro

La A. E. D.-konferenco en Graz (7. decembro 1924) decidis, okazigi ĉiujare Tutaŭstrian Esp.-kongreson. Landestro de Salzburg proponis por tiu ĉi jaro kongresurbo Salzburg. Landestraro de Wien en sia lasta kunveno (14. marto 1925) konsentis kaj proponis aranĝi la kongreson tuj post la XVIIa.

Esp.-Societo por Stirio en Graz. La stiria gazetaro ekinteresiĝas pri Esp. Ni jam raportis, ke la „Grazer Montagszeitung" deklaris sin preta, subteni la Esp.-movadon redakcie. En la lasta monato represis la ĉiutaga ĵurnalo „Neues Grazer Tagblatt" artikolon pri la venonta Esp.-kongreso en Genève kaj precipe ĝi atentigis pri la valoro de la Esp.-universitato dum tiu kongreso. Al la alsendinto de tiu artikolo nia membro d-ro Halbedl nia societo ŝuldas treegan dankon. — La dancvespero „Nokto sub la verda stelo" okazis laŭprograme la 21. februaro. Ĝi estis vera festo de la Graz-a loka grupo. Kun helpo de kelkaj sinjoroj la f-inoj Calisto kaj Rogler estis tre bele ornamintaj la noblan salonegon. Post salutvortoj de la grupestro s-ro Rogler ĝojigis la vere bonkvalita kvinteto Ernst-Hüttner la ĉeestantajn gastojn per bela muziko. F-ino Elsa Batteg kaj s-ino Haas-Hönigmann kantis belvoĉe kelkajn kantojn kaj sukcesis tial grandan aplaŭdon. Ĉarmaj Wien-aj valsoj poste allogis la gedancemulojn. Dum la paŭzo surprizigis s-ro Wallner la partoprenantojn per japanaj ombraj figuroj. La feston partoprenis ankaŭ redaktoro de la Graz-a gazeto „Grazer Tagespost" s-ro inĝ. Oberegger, kiu raportis en la menciita gazeto (24. febr.) laŭdante la Esp.-feston. Ĉi tie nian plej koran dankon pro lia vizito kaj raporto. — La polica kurso ankoraŭ daŭras. Fine de marto okazos la skriba ekzameno.

Graz. Atentu! Marde la 24. marto kunveno de la loka grupo Graz en Admonter Keller. S-ro Rolf Hallamayer parolos pri radio.

Leoben. Laŭ ekzemplo de la loka grupo Graz de Esp.-Societo por Stirio komencas nun ankaŭ nia loka grupo Esp.-propagandon per radio. Al kelkaj radioentreprenoj ni jam disdonis pogrande flugfoliojn. Pro baldaŭa ekfunkcio de la Graz-a radiosendstacio, kies programon oni ankaŭ povos akcepti en Leoben, ni esperas sukceson per tia propagando.

Grupo St. Pölten aranĝas ĉiun vendredon je la 7a ekzercadvesperon en kafejo „Linzertor", Linzerstrasse. La grupo sukcese klopodis, aranĝi du kursojn en la Volkshochschule (t. e. popolaltlernejo) kun 70 partoprenantoj kaj inaŭgurigi en la centrobiblioteko de la Gewerkschaftskartell (t. e. laborista unuiĝo) sekcion por Esp. literaturo. (Ni gratulas! La red.)

Atentu aldonon de firmo Hirt & Sohn, Leipzig. Vendejo por Aŭstrio R. Foltanek, Wien I, Ballgasse 6.

Esperanto-Delegitaro de Wien

Wien XXI, Am Spitz 14.

Esp.-Societo „Fideleco“, Wien XVIII, Staudgasse 1 (Währinger Bürger-Café), ĉiun mardon 5—7.

Esp.-Societo „Junularo“, kafejo „Molkereihof“, III, Radetzkystrasse 23, je la 7a parolos: 19. marto s-ro Taussig, 26. marto s-ro Lempert el Riga, 2. aprilo f-ino Berger, 16. aprilo s-ro Braun, 23. aprilo s-ro Altrichter el Korneuburg kaj 30. aprilo f-ino Placzek.

Societoj de la Libera Esp. Laborkomuno en Wien. Esp.-Soc. „Danubio“, prez. s-ro R. Čech, VII, Lerchenfelderstrasse 23 (kafejo); lunde 7a vesp. — Viena Akademia Esp. Unuiĝo, prez. s-ro stud. med. Josef Holzner, kaj „Vesperto“, Dramatika Rondo Esp., prez. s-ro H. Schicketanz; ambaŭ societoj kunvenas kun Esp.-Soc. „Danubio“. — Esp. Rondo Wien IV, gvid. s-ano Mg. A. Taussig, IV, Hauptstrasse 40 (kafejo); marde 7a vesp. — Esp.-Junularo, prez. s-ano Fr. Braun, III, Radetzkystrasse 25 (kafejo); ĵaŭde 7½ vesp. — Esp.-Soc. „Progreso“, prez. s-anino J. Pick, IX, Schwarzspanierstrasse 15 (kafejo); vendrede 7a vesp. — Bohema Klubo Esp., prez. d-ro H. Jokl, XIV, Turnergasse 9 (Narodni dum); vendrede 8a vesp. — Esp. Konversacia Rondo Wien XVI, gvid. s-ro A. Mair, XVI, Ottakringerstr. 119 (kafejo Hrdy); merkrede 7a. — Eldona Kooperativo de E. U. P., adreso: Wien II/14, Postamt 34.

Unua Esperanto-Unuiĝo en Wien, I, Weihburggasse 12 (Kasino). En la 22. ordinara ĝenerala kunveno la 15. februaro estis elektita la jena estraro: Prezidanto kortkons. inĝ. F. Hartwich, 1. vicprezidanto d-ro E. Sós, 2. vicprezidanto O. Schwarz, sekretario inĝ. E. Sinek, anstataŭanto f-ino E. Raff, kasisto magistro A. Taussig, bibliotekisto f-ino E. Raff, anstataŭanto f-ino K. Mayrleb, arĥivisto f-ino B. Subert. Ĉiun vendredon je la 19a kunveno kun interesa programo. Gastoj estas bonvenintaj. — La 6. marto parolis s-ro kapitano O. Sinner „Travivaĵoj en Siberio“, la 20. parolos s-ro prof-ro d-ro H. Jokl „Divido de la homaro laŭ vidpunktoj etnografia kaj antropologia“.

Wiener Lehrer-Verein „Esperanto“ reelektis en sia ĉefkunveno 21. februaro prezidanton dir-on Fritz Stengel, sekretarion s-on Smital, kasiston s-on Stark. Ĝi ŝanĝis pli ampleksigante sian statuton konforme al nuntempaj bezonoj. De nun ĝia titolo estos „Oesterreichischer Lehrerverein »Esperanto«“. La novaj aktivaj membroj (instruistoj) energie laboras preparante sin por la ŝtataj ekzamenoj.

Universala Esperantista Pacifista Ligo

Centro: Wien I, Hofburg (Aŭstrio).

Internacia Virinligo por Paco kaj Libereco. Ĝia aŭstria sekcio ŝanĝis sian adreson. La nova estas: „Oesterreichische Sektion der Internationalen Frauenliga für Frieden und Freiheit, Wien III, Henslergasse 3, Hochparterre.“

HEROOJ.

Amikoj, mi volas paroli pri aliaj herooj, herooj, kiuj ne ekzistas en viaj lernolibroj. Kiuj estis la herooj de viaj lernolibroj? Hannibalo, Aleksandro Granda, Napoleono I. Kio estis la celo de iliaj deziroj, la sopiro de iliaj noktoj? Neniigi la kontraŭulon, la „malamikon“ sangbati. Kion faras viaj historiistoj? Laŭdas ilian gloron, famigas ilian grandecon, glorifigas la agojn. Ĉu vi jam pripensis, el kio konsistis „la grandaj faroj“ de ili? Ĉu vi scias, ke ili mortigis homojn, detruis urbojn kaj vivsonĝojn? Ĉu vi scias, ke ili disigis patrinojn de iliaj filoj, virinojn de viroj, knabinojn de junuloj kaj ilin pelis en sovaĝajn batalojn. Kaj tamen: oni ne taksas la glorbrilon ĉirkaŭ la kapoj de tiuj, pri ili oni ne kantas himnojn.

Ĉu ni devas ankoraŭ miri, ke niaj junuloj sonĝas pri „heroaj“ agoj kaj ke ili en amasmortigantoj vidas diojn kaj heroojn? Ĉu ni devas miri, ke ili de falsa ambicio puŝitaj volas imiti „kuraĝajn prototipojn“, ke ili laŭ junula entuziasmo sopiras je militaj agoj? Ni devas transseligi, transborden ĵeti niajn lernolibrojn kun la poetaj laŭdoj por la „grandaj militherooj“. Ne ili estas la grandaj herooj!

Estas jam tempo, ke ni forŝiru la maskojn de ili! La veraj herooj ne instruas malamon kaj ne sangavidas, ne predikas subpremon kaj ne instigas al

mortigado. La veraj herooj venas kun la vorto amo. Ili scias, ke ĉiuj homoj estas fratoj. Ili konkiras novajn regnojn, sed per la bataliloj de la spirito, kiuj estas eternaj.

Kio restis de la verko de Hannibalo, kio estas la vivoverkajo de Aleksandro Granda, kie estas la agoj de Napoleono?

Sed la vortoj de Moseo, Christus, Buddha, Aristoteles, Spinoza, Kant, Marx, Newton, Einstein kaj aliaj restas ĉiam vivantaj. Ili estas ĉerpitaj el fonto de l' eterneco.

Ni bezonas novajn heroojn, heroojn de la spirito, heroojn de la koro, heroojn, kiuj nin gvidas supren sur la altaĵojn de la vivo kaj ne puŝos al sangaj malvirtoj. Ni sentas: nepras esti alie; pli lume, klare, libere. Ĉio putranta kaj malsana devas forlasi la mondon, ni bezonas novajn batalantojn, soldatojn en nova armeo de la lumo.

Nia batalilo estu la spirito, nia forto la volo. El la rubo kaj la ruinaĵoj de la mondmilito devas stariĝi iu novaĵo kaj io sana. La „nova" estas: paca kunvivo de ĉiuj homoj sen diferenco laŭ deveno, konfesio kaj nacio. La „sana" estas: kreado de ekonomia bazo, kiu evitas riĉulojn kaj malriĉulojn, kapitalistojn kaj proletariojn. La al nova produkto vekiĝanta homo volas rajton je vivo kaj laboro. Li ne volas plu esti duoninfano de la vivo. Liaj okuloj servu por ekkoni la belecon de la mondo kaj per siaj oreloj li aŭskultu belajn sonojn de la vivo. La vojo devas esti libera por la nova homo, kiu volas krei mondon alian.

La nova homo volas homrajton. Vekiĝu kaj levu vin! Vekiĝu! Vin, kiuj la suferojn de l' mondmilito travivis, koncernas la voko! Kion vi nomis vivon, tio estis nur krepusko. Forskuu, vekiĝu el la perforte altrudita dormstato kaj rigardu per novaj okuloj ĉirkaŭ vi.

Novaj torĉoj ekbrulis! Ne estingu ilin! Ili lumas por vi! Ekbruligu novan torĉon de libereco, egaleco kaj homeco!

Estis krepusko en Eŭropo kaj en la nokto de l' krepusko fluis la sango.

Nun devas fine ekesti lumo. Milionojn da torĉoj oni bezonas! Ekbruligu ilin! Tie, ĉi tie kaj ĉie. Ili lumu, por ke en koro de Eŭropo ekestu klare kaj hele.

A. Mildwurf, Wien.

La organo de la militkontraŭuloj „Der Kriegsdienstgegner" dank' al energia kaj persista laboro de f-ino Morgenstern (Wien) de nun aperas en pli granda formato por havi lokon por konstanta de ŝi prizorgata kaj de d-ro Pfeffer (Wien) redaktata Esp.-parto dupaĝa. Al ambaŭ oferemaj pacifistaj gesamideanoj koran dankon!

ANONCOJ 3liniaj anonc. 7000 aŭ. K. Reklamo 1/1 pĝ. = 250 mil., 1/2 = 130 mil., 1/4 = 70 mil., 1/8 = 40 mil. aŭ. K; je 3foja enpreso 5% rabato.

HEROLDO DE ESPERANTO
(früher „Esperanto Triumfonta")
das neutrale Organ der Esperantobewegung
erscheint seit 1. Dezember 1924
ZWEIMAL IN DER WOCHE
in Tageszeitungsformat und illustriert und kostet, durch die Post bezogen, bei halbwöchentlicher Zustellung vierteljährlich zirka 5 öst. Schill., direkt durch den Verlag vierteljährlich 7.50 öst. Schill, bei wöchentlicher Zusendung (je zwei Nummern zusammen) vierteljährlich 5.63 öst. Schill.
Reichhaltiger Lesestoff: Wissenschaft, Technik, Radio, Handel, Sport, Literatur, aktuelle Esperanto-Chronik usw.
Probenummern gratis und franko durch den Verlag
HEROLDO DE ESPERANTO, HORREM BEI KÖLN

10,000

membrojn
devas
havi

UEA

en 1925.

Aliĝu tuj por atingi

10000

Kotizoj pageblaj al la loka delegito aŭ rekte al U E A, Genève.

Uzu la aldonitan aliĝilon!

„Anker"-drogejo
de
magistro de farmacio
A. TAUSSIG
Wien IV,
Wiedner Hauptstrasse 24
Ĉiuspecaj drogoj kaj parfumoj

KUDROMAŜINOJ
BICICLOJ KAJ
SKRIBMAŜINOJ
PICK - WIEN
Centra magaz.: IX, Liechtensteinstr. 27
Filioj: IV, Wiedner Hauptstrasse 10 kaj
VI, Gumpendorferstrasse 67.
Oni parolas Esperante!

Eldona Kooperativo
de E. U. P.
rekomendas lernilojn de Esperanto por germanoj kaj ĉeĥoj, jarkolektojn de „La Esperantisto" kaj ĉiujn aliloke eldonitajn instruilojn.
Mendeble ĉe **R. ČECH, Wien IX/1,**
D' Orsaygasse 7/23.

SUKERAĴISTO
ANDREAS DEISTLER
Del. de U. E. A.
Wien VII, Schottenfeldgasse 91
Granda elekteblo je sukeraĵoj, tortoj, bombonoj, ĉokoladoj k. t. p. por ĉiuj okazoj.

ELDONEJO

PAUL KNEPLER

(LIBROVENDEJO WALLISHAUSSER)

WIEN I, LICHTENSTEG 1

ŜOLANDRO de Waldemar Bonsels. Tradukis d-ro Edm. Sós. (Belega rakonto) . . . . . Ŝ 1.50 (Gm. 1.—)

LA PANEŬROPA MANIFESTO de d-ro R. N. Coudenhove-Kalergi. Tradukis d-ro Edm. Sós . . . Ŝ —.60 (Gm. —.40)

VOLLSTÄNDIGER LEHRGANG der internationalen Hilfssprache Esperanto von J. Glück und Dr. Edm. Sós. (10.—20. Tausend) . . . . . Ŝ 1.50 (Gm. 1.—.)

Konstanta provizo de verkoj el la tuta esperanta literaturo!

Esperanto-Schlüssel, la plej bona propagandilo por germanoj.

Perloj de la Esperanto-literaturo!

La tradukajoj de d-ro Zamenhof, Grabowski kaj d-ro Kabe ree haveblaj!

Ni liveras jenajn verkojn:

Fundamenta krestomatio . .	40.000 K	Mazepa de Slowacki	16.000 K
Georgo Dandin de Molière	15.000 „	La interrompita kanto . . .	8.000 „
Hamleto de Shakespeare . .	24.000 „	Pola antologio	15.000 „
Ifigenio en Taŭrido	27.000 „	La fundo de l' mizero de Sieroszewski	8.000 „
Rabeno de Baharah de Heine	18.000 „	Fabeloj de Andersen	27.000 „
La Gimnazio de Ŝalom Alehem		Halka de Wolski	10.000 „
La Rabistoj de Schiller . .	24.000 „	Vortaro de Esperanto de Kabe	40.000 „
La Revizoro de Gogol . . .	22.000 „	Esperantokurso por Germanoj	2.000 „
Marto de Orszeszko	46.000 „	Esperantokurso por Ĉeĥoj .	2.000 „
El Biblio: Eliro	15.000 „	Esperanto-poŝkalendaro 1925	7.000 „
Levidoj	15.000 „	Kolekto de la Esperantisto 17 numeroj po	2.000 „
Sentencoj de Salomono . .	10.000 „		
Predikanto	7.000 „		

Kontraŭ antaŭpago aŭ poŝtŝarĝo kun 10% por poŝtelspezoj.

Libera Esperantista Laborkomuno, Wien VII, Lerchenfelderstrasse 23

Eldonanto: Esperanto Unuiĝo en Korneuburg (Redaktoro: Hugo Steiner, Korneuburg, Hovengasse 12). — Presejo: Gstaltner & Co., G. m. b. H., Korneuburg, Kirchengasse 3.